Informilo de SES ( SES 通信＃170) '18 / 4 / 1

# Saluton, SES anoj

S–ro Bambuido

Antaŭ ĉirkaŭ 40 jaroj en iu novjara festo mi en kimono veturis per trajno al Oomoto-centro en urbo Kameoka en gubernio Kioto. Survoje, kiam la trajno haltis ĉe la stacio Suita, 5 eksterlandanoj envenis kaj ekstaris antaŭ min. Ŝajnis al mi, ke ili interpaloris hispane tre gaje. Kaj ili reciproke demandis, ĉu la trajno atingos Kioton? Do,mi diris al ili “Jes,la trajno atingos Kioton. Mi estas esperantisto, kaj mi povis iomete kompreni vin.” “ Esperanto!?” Kriis unu el ili, kaj la aliaj fingre montris la kriinton, kiu etendis sian manon al mi por manpremo. Hazarde li estis brazila esperantisto. Kiam mi anoncis, ke mi devas foriri ĉe la venonta stacio por iri al Oomoto, do li deziris akompani min kune kun sia argentina amiko. Kaj la aliaj tri amikoj daŭrigis sian vojaĝon al Kioto. La brazila esperantisto konis pri Oomoto, kaj esperis viziti ĝin jam de antaŭe. Revenvoje mi volis inviti ilin al mia domo kaj telefonis al mia patrino, ĉu ŝi permesas tion, do ŝi bonvenigis ilin, ĉar estis ja novjara festo, abundis frandaĵoj! Do,ili ekĝojante, manĝis multe kaj gaje kantadis taktante per skatolo de alumetoj. La brazilano ŝatis precipe bambuidan kuiraĵon. Poste mi ricevis dankleteron de li, kiu studis en la elektra kompanio Sanyo en Suita dum kelkaj monatoj. Sur la koverto estis skribita “s-roTAKENOKO”. ( Sunjo )

＃土曜例会で読み終わった Ĝambo rafiki では殆どの方が知らないエチオピアの習慣や歴史など新知識に触れて世界の広さを再認識しました。始めたばかりの De Patagonio ĝis・・にもそんな面白さがあり、Sekelj 氏の経験と認識の豊かさに驚かせられます。是非皆様のご参加を期待します。